



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 5-a de Julio 2020 (per ZOOM)

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Mikaelo Lineckij, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Eran Yuval-Vodevoz, Gabi Zeevi.

Protokolo de la pasinta kunsido estis sendita al la estraranoj kaj baldaŭ enretigota.

La Estraro de ELI esprimas siajn elkorajn kondolencojn al nia kolego kaj amiko Gabi Zeevi kaj ties familio pro la trofrua forpaso de lia filino Michal.

1. Raportoj (Jehoŝua)

a) Nur relative lastatempe, dum la koronavirusa kvaranteno, mi eksciis pri la forpaso (2020-03-09) pro kor-nesufiĉeco de unu el niaj veteranaj samideanoj (el la sesdekaj jaroj), **Uzi Sela**, 83-jaraĝa. Li loĝis en Kirjat-Mockin, sed delonge ne aktivis pro sia sanstato; mi jam kondolencis nome de la Estraro al lia edzino Reli.

b) La luantoj pagis pere de Amos Ŝapira 3,500 NIS, jam enkasigitaj.

c) La advokato Yossi Omid sendis al mi raport-mesaĝon pri la antaŭeniĝo de la projekto “Konstruo_Evakuo” inkluzivanta nian Dratverejon.

2. Reguloj pri informado en ELI (Jehoŝua)

Pro la lastatempa fuŝo pri disvastigo de grava informo al nia membraro mi proponas la jenon: kiam okazos estonte ia grava evento, kaj ajna membro de ELI (despli estrarano) informiĝos pri ĝi, tiu tuj devas transdoni la informon al Eldad aŭ Dror por rapida publikigo al la membraro. **Decido:** akceptita.

3. Raporto de la Kontrol-Komisiono pri 2019 (hebrea malnetaĵo - Ŝlomo)

Estas proponita unu korekto pri la Datumbazo de la membraro de ELI:

“Reago de la Estraro: ĝi **ne** akceptas la rekomendon de la Komisiono unuigi du datumbazojn, tiun de la Membrolisto kun tiu de la librotena fako, kiu inkluzivas interalie eĉ la kvitanc-numerojn.” La Estraro dankas la Komisionon pro la ampleksa Raporto kaj unuanime **akceptas**.

4. Israela Esperantisto n-ro 169 (Mikaelo)

Amri sendos hodiaŭ la ĝisdatigitajn diagramojn – ĉio alia estas jam reviziita kaj nur atendas la definitivan engaĝigon.

5. Renovigo de la domajno de ELI (Dror)

La kosto estas 67 sikloj jare. Propono: ni renovigu por la venontaj du jaroj.

Decido: unuanime akceptita.

.../2



6. Landa Kunveno en Julio (Jehoŝua)

Efrati helpis redukti la prezon de la Administreja salono de 1,870 al 1,400 NIS, kun limigo ĝis 50 homoj. Sed ĉar la lasta registara dekreto limigas ĝis 20 homoj en fermitaj salonoj – ni devas nuligi la Landan Kunvenon en la planita formo! Anstataŭe ni aranĝos Virtualan Landan Kunvenon (per Zom-programo) la 21-an de Julio, inter la 18h00 – 20h30. Ŝlomo devos dissendi la buĝeton pere de Amri al la ELI-listo, kaj dum la LK peti la aprobon de la membraro. **Decido:** unuanime akceptita!

7. Israela Virtuala Esperanto-Klubkunveno – IVEK (Amri)

Intertempe la kunvenoj de la Tel-Aviva Klubo “Josi Ŝemer” transiru al mardoj (anstataŭ ĉiun lundon ĝis nun) – je la samaj horoj. **Decido:** akceptita.

8. UEA kaj ELI (Amri)

a) Lastatempe malkreskis la nombro de la Individuaj Membroj de UEA el Israelo; inter la kaŭzoj: la baza membro-kotizo pli ol duobliĝis ekde 2019 (dum la simbola MG-kotizo estis abolita), la paperforma Jarlibro malaperis.

b) La Ĝenerala Direktoro Martin Schaeffer plendas pri nericevo de la spezfolioj.

c) Eblas aliĝi al la VK (Virtuala Kongreso – anstataŭ la UK en Montrealo) ĝis la 26-a de Julio – senpage por la pagintaj UEA-membroj! **Propono:** Jehoŝua klopodu varbi inter la iamaj individuaj membroj, tiel ke ĉiu pagu la minimuman UEA-membrecon pere de li antaŭ la limdato kaj tuj sendu la nomojn al la ĜD (poste la spezfoliojn mem!).

9. Somerfina Renkontiĝo (Jehoŝua)

Ĉar ĝi estas dume nia sola ŝanco je fizika renkonto, ni provu (helpe de Michal Amir) aranĝi ĝin ĉe “Alter Nativ” (10 Dubnov-str, TA), la lastan mardon de Aŭgusto, la 25-an, inter 18h00 – 20h00 – se permesos tion la venontaj registaraj dekretoj. **Decido:** Akceptita.

La venonta kunsido: la 8-an de Septembro, 2020, je la 20h00

Protokolis: Gabi Zeevi